

Junio 2015


SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

La Espero

2015:2

Kongreso en Upsalo

Mikaelo Bronŝtejn



Anoj el la grupo La Perdita Generacio



Christer Kiselman



Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2014 • 102-a jarkolekto

Fondita en 1913

Redaktion: Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

sveda@esperanto.se

E-post till redaktionen: laespero@esperanto.se**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm**Utförning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson**Tryck:** Pingvinpress, Råå**Prenumeration 2014:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Besöksadress: Esperanto-Centro, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm**E-post:** sveda@esperanto.se**Nätsida:** www.esperanto.se**Öppettider:** Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123**Medlemsavgift 2014:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs-exemplar kostar 100 kr/år).

UEA-avgifter och prenumerationer: Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Box 2276, 103 17 Stockholm**Postgiro:** 578-5**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona**E-post:** eldona@esperantosverige.se**Telefon:** 070-5850054

ESPERANTOGÅRDEN

Adress: Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,**Nätsida:** www.esperantogarden.se**E-post:** info@esperantogarden.se**Telefon:** 0590-309 09

Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

e-post: laespero@esperanto.se

	<i>Stoppdatum</i>	<i>Utkommer senast</i>
Nr 1	1 februari	1 mars
Nr 2	15 maj	5 juni
Nr 3	20 augusti	15 september
Nr 4	1 november	1 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan. sv

Nyheter i styrelsen

Merparten av den sittande styrelsen blev omvald: Ann-Louise Åkerlund fortsätter som ordförande, likaså Olof Pettersson som vice ordförande, Puff Östling som sekreterare, och Stella Lindblom som IT-ansvarig och Dan är ledamot då medlems-hanteringen övertas av den nytillsatta kassören Anita Dagmarsdotter. Anita har blivit formellt invald i styrelsen i stället för att som tidigare vara adjungerad som ansvarig för bokförlagen.

Bengt Olof Åradsson, som tidigare varit suppleant, lämnar styrelsen men kvarstår som redaktör för La Espero (tillsammans med Olof Pettersson). I hans ställe välkomnar vi ett för de flesta helt nytt ansikte: Gabriel Erixon från Luleå! Gabriel är 31 år och arbetar som undersköterska inom hem-tjänsten. Han började med esperanto i maj 2014.

Oförändrad medlemsavgift och uppmärksammande av Valdemar Langlet

Medlemsavgiften förblir oförändrad (200 kr/år för direktmedlemmar), men en ny kostnadsfri nivå av medlemskap (eller snarare, 'med frivillig, valfri medlemsavgift') införs: Esperantovänner. Detta medlemskap är riktat till personer som kanske inte omedelbart vill ta steget att bli fullt betalande medlemmar, men ändå är intresserade av esperanto och vill visa sitt stöd.

För medlemmar som vill stödja SEF ekonomiskt utöver medlemsavgiften finns Rondo Langlet, uppkallad efter Valdemar Langlet som uppmärksammades lite extra i form av kongressens invigning i Valdemar Langlets park. Langlet uppmärksammades ytterligare genom Martin Strids framförande av La Valdemara balado, ett kväde i färöisk stil som berättar om hans levnadshistoria.

Tack till LKK och alla deltagare!

Kongressen blev ovanligt välbesökt med totalt 55 anmälda deltagare. Den innehöll flera kulturella inslag; en rundvandring i Uppsala, ledd av Leif Nordenstorm, framförandet och dansandet av det nyss nämnda Valdemarkvädet, La Perdita Generacio spelade på Ungdomens Hus, och Mikaelo Bronstein bjöd på såväl poesirecitation som sång.

Styrelsen vill ännu en gång tacka Uppsala Esperantoförening tillika den lokala kongresskommittén (LKK) för en mycket lyckad esperantokongress, och inte minst alla som deltog och hjälpte till att göra den till vad den var!

Styrelsen

Esperanto-Societo de Upsalo havis la ĝojon aranĝi Svedan Esperanto-Kongreson. Lastfoje ni faris tion en 1993. Estis inspira kaj amuza tasko. Mi aparte ĝojas pri tio ke ni sukcesis aranĝi plurajn publikajn aranĝojn, en kiuj partoprenis ankaŭ neesperantistoj: koncerto kun La Perdita generacio en Junulara domo, koncerto kun Mikaelo Bronŝtejn en la kongresejo Drabanten kaj dulingva diservo en la sveda kaj en Esperanto en la katedralo. Ni ankaŭ estis iom videblaj dum la inaŭguro en la Parko de Valdemar Langlet, kie Martin Stridh kantis kvadkanton pri Valdemar Langlet.

Leif Nordenstorm

Arets SEF-kongress var, tycker jag, mycket bra. Kanske den bästa efter Borlänge för några år sedan. Speciellt värt att nämna är att styrelsen gått ifrån detta med ett obligatoriskt paket innefattande även boende, så att de som bor i närheten eller har boende på annat sätt slipper dubbel logikostnad. Höjdpunkterna var Christer Kiselmans föredrag om Akademien och Mikaelo Bronŝtejns konsert.

Bengt Nordlöf

La Esperantokongreso en Uppsala estis ege bone aranĝita kun tre varia kaj interesa programo. Uppsala ja estas el pluraj vidpunktoj historie grava urbo, ne malplej por ni esperantistoj. Tion la kongresanoj povis konstati dum urba promeno sub sperta gvidado de Leif Nordenstorm vendrede. Dum tiu ni ne nur vizitis la Placon de Valdemar Langlet sed ankaŭ plurajn aliajn vidindaĵojn en la urbocentro.

Tuj post la rondpromeno ni revenis al la Placo de Valdemar Langlet kie la inaŭguro okazis. Dum tiu Martin Strid prezentis eltiraĵon el sia longa balado pri Valdemar kreita laŭ la speciala formo de feroaj kvadoj (kväden). Pro tiu lia renovigo de tre aĝa kant- kaj danformo li gajnis laŭdojn eĉ en la Feroaj insuloj. Bedaŭrinde tiu mallonga eltiraĵo estis la sola parto de la balado kiun mi povis ĝui, ĉar mi maltrafis la vesperan programon kie la tuta verko kun akompana danco estis prezentata. Tio kion mi vidis tamen ege imponis kaj mi esperas ke prezentado de la Valdemara balado de Martin estu konstanta programero de ĉiuj niaj kongresoj ek de nun!

Sabate kelkaj el niaj eksterlandaj gastoj prelegis. Unue Mikaelo Bronŝtejn donis vivan kaj personan trarigardon de la rusa poezio kaj posttagmeze Jadwiga Greger kaj Elwira Twardowska, la du polaj gastoj, rakontis pri la venontjara kongresurbo Gdansk kaj ĝiaj najbarurboj Gdynia kaj Sopot ("Gdansk kaj Gdynia mal-

amas unu la alian sed Sopot-on ĉiuj amas"). Denove mi tre bedaŭrinde maltrafis la vesperan kantprogramon kun Mikaelo, ĉar la ŝlosila sistemo de la pordego de la domo de mia filo en Stockholm, kie mi tranoktis, parte ĉesis funkcii kaj ne permesis eniron post la 22-a.

Fine de la kongreso dimanĉe antaŭtagmeze Christer Kiselman, la prezidanto de la Akademio de Esperanto, brile prelegis pri siaj akademaj kamaradoj kaj la laboro de la akademio. Poste li respondis al amasoj da demandoj.

Mi nur tuŝis, de mi, la plej ŝatatajn programerojn. De tio vi tute prave konstatas ke la diversaj jarkunsidoj estis por mi malpli interesaj. Tamen mi konstatas ke ili iris glate, jes eĉ tiel glate ke la prezidanto de la jarkunveno de SEF, Leif Nordenstorm, devis admoni al ni paroli plu, ĉar la kunveno minacis esti tro mallonga! Eĉ pleje mi tamen ŝatis la kunestadon kun malnovaj kaj novaj esperantoamikoj.

Ankaŭ estis agrable konstati ke krokodilado preskaŭ ne okazis. Jes, mia cerbo estis tiel plena de Esperanto ke mi eksaltis de surprizo kiam mi dum la sabatvespera bufedo ĉe restoracio "Dragon Place" ekaŭdis la svedan ĉe iu tablo. Parolante pri tio, mi konstatas ke tiu bufedo estis alia pinto de la tuta programo, jes, plej verŝajne eĉ la plej bongusta iam dum iu sveda esperantokongreso.

Haldo Vedin



Sten håller upp omkvädet till Martin Strids Valdemara balado.



Ann-Louise talar under invigningen



Kadre de la projekto de UEA, SEF aranĝis AMO-seminaron pri informado la 14-15an de majo en Upsalo. Gvidanto estis Stella Lindblom, kun helpo de la “asista saĝulo” Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA.

Ni seminariis en *Fjellstedtska skolan* la tagnokton antaŭ la sveda esperantokongreso. Aliĝis 14 homoj, sed surloke la kvanto iom ŝancele ŝanĝiĝis tiel ke plej ofte estis inter 12 kaj 15 partoprenantoj en la ĉambro sed entute 17 individuoj ĉeestis.

Dum la du antaŭaj kunvenoj en Lesjöfors (majo 2014) kaj Skövde (marto 2015) ni jam konstatis KION ni devas produkti por informi. En Upsalo la ideo estis esplori KIEL ni povus antaŭenigi la procezon pri informado. La celo estas finfine krei eksterestraran grupon kiu interesiĝas pri diversaj perspektivoj kaj partoj de la vasta kampo Informado.



Antaŭpreparo

Dum kelkaj monatoj mi priensis la demandon “Kiel aspektu informoj?” kaj mi alvenis al la respondo ke ne estas mi persone kiu respondu tiun demandon. Anstataŭ doni respondon, mi kreis seminarion kie ni kune esploris eblan respondon.

Inter pluraj eblecon, mi finfine elektis tri filmoj el TED (ted.com) kiu havas multege da indaj kaj interesaj filmetoj de individuoj kiuj havas ion gravan por rakonti al la homaro. Per tiaj filmoj, ni povis havi interesajn kaj kompetentajn prelegantojn tute senkoste.



Prelego 1 – de Simon Sinek

“Komencu per KIAL”. Simon Sinek atestas ke la natura ordo informi estas KIO - KIEL - KIAL, sed ke la plej furoraj kaj sukcesaj kompanioj inversis la ordon. Li ekzempligis per Apple kaj ilia kampanjo “Think different” (Pensu malsama). Tiuj, kiuj plej rapide sukcesas komuniki siajn bazajn “kialojn” kaj valorojn, venkas la batalon por kapti la intereson de la publiko. Por sperti la diferencon, ni grupe kunlaboris por krei informilon uzante la KIO-KIEL-KIAL-direkton, sed

ankaŭ la KIAL-KIEL-KIO-direkton. Poste ni povis konstati ke estas granda diferenco inter la rezultoj.

Ni traktas la KIO-informojn en la plej nova parto de la cerbo, kie troviĝas intelekto kaj lingvo, sed se iu ne interesiĝas pri temo, oni nur havas kelksekundon por kapti la intereson. Se, anstataŭ informi per multaj vortoj, ni povas vekti emociojn kaj entuziasmon per valoraj vortoj kaj bildoj. Poste ni povas informi pri la KIO-aferoj, kiam la celato decidis fakte aŭskulti la informojn. (Serĉu TEDe aŭ en JuTubo lian nomon kaj ‘start with why’.)

En dua parto de la prelego de Simon Sinek temas pri kvin ĉefaj manieroj en kiuj homoj traktas novajn informojn.

Pioniroj – 2, 5 % – serĉas novaĵojn kaj rapide adaptas ideojn.

Fruaj adaptantoj – 13,5 % – aŭskultas la pionirojn kaj tuj testas novaĵojn se iu diras ke bonas.

Frua plimulto – 34 % – tiuj kiuj nur akceptas ion kiam ĝi estas konata

Malfrua plimulto – 34 % – tiuj kiuj nur akceptas ion se “ĉiuj aliaj” jam faras

Malfruuloj – 16 % – nur akceptas ion se ne plu eblas elekti alian solvon

Ni konstatis ke Esperanto ankoraŭ estas temo por pioniroj. Tio povas esti fakto por memori kiam ni volas varbi.

Prelego 2 – de David Logan

Nia dua preleganto estis David Logan kiu esploris pri sociaj grupoj kaj kiel ili funkcias. Sian prelegon li nomis “Tribal leadership” (triba estrado). Temas pri alimaniere grupigi la homaron en kvin grupojn. Temas pri “subgrupaj kulturoj”. La grupoj iras de la plej malafabla kaj malĝoja, ĝis la plej afabla kaj supozeble profunde feliĉa.

Vivo merdas – 2 % – krimuloj, kiuj detruas funkciajn sociajn kontaktojn.

Mia vivo merdas – 25 % – viktimoj, kiuj pensas ke ĉiuj aliaj havas pli bonan vivon.

Mi grandiozas – 48 % – la plimulto, kiu kverelas kaj daŭre provas montri ke ili pli bonas ol ĉiuj aliaj.

Ni grandiozas – 22 % – bone funkciaj grupoj kun komunaj interesoj kaj valoroj.

Vivo grandiozas – 2 % – la malplimulto kiu akceptas vivon kaj neperforte agas.

La seminaria grupo iom havis problemon kompreni kiel uzi tiun ĉi modelon, sed la ideo estis montri ke ni ĉiuj apartenas al diversaj ‘triboj’ kun diversaj internaj valoroj, kaj pri tio oni povas pensi varbante kaj informante pri Esperanto. Ekzemple estas multe pli facile komenci varbi homojn en la samaj triboj, ĉar ili verŝajne jam aŭskultas vin. Vi ankaŭ povas esplori al kiuj triboj vi apartenas, kaj se tio helpas aŭ malhelpas vin. La partoprenantoj de unu grupo nur povas kompreni la saman kaj najbarajn grupojn. Vere diligentaj gvidantoj kaj estroj povas paroli la dialekton de ĉiuj kulturaj subgrupoj. Per niaj agoj ni povas helpi la grupojn al kiuj ni apartenas, evolui al pli alta nivelo. (La filmeton vi povas trovi en TED kaj JuTubo serĉante “David Logan tribal”)

Prelego 3 – de Shaun Achor

La lasta preleganto estis Shaun Achor. Li esploras pri ‘pozitiva psikologio’ kaj lia ideo estas ke ni uzas malutilan ordon de Laboro kaj Feliĉo. La kutima supozo estas ke feliĉo venas post sukceso, kaj ke sukceso nur venas post pena laboro. Sed laŭ Shaun la cerbo multe pli bone laboras kaj ni estas multe pli sukcesaj se ni komencas per sento de feliĉo. Post longa, sed tamen amuza enkondukita rakonto pri sia fratinino, li alvenas al la kerno de tiu modelo.

Grupete ni diskutis manierojn krei pli da feliĉo en la movada laboro, por esti pli sukcesaj.

Fina parto – dua tago

Dormo estas bona maniero por niaj cerboj reordigi informojn, kaj tial la seminario estis dutaga por ebligi bonan dormon kaj reordigon de la peza materialo dum la unua tago. Mia ideo estis ke mi povu altigi la konscian nivelon de la seminaria grupo, pere de la modelo de Logan, doni eblecojn havi bonan kaj interesan seminarion por altigi la feliĉon en la laboro, kaj aldoni metodojn por senti sin pli sekura en la informada laboro.

Fine enkondukante, mi precizigis la temon de la seminario al kvar paŝoj.

Stella Lindblom

På tåget till Skövde upptäckte jag Valdemar Langlet

Visst har jag många gånger hört namnet Valdemar Langlet i esperantosammanhang, men det var först efter den 14 mars i år som han blev mer än ett namn.

Vi var tre göteborgare på väg till en informationsdag, som SEF ordnat i Skövdeklubbens lokal. Vi satt och pratade om lite av varje, Ingegerd, Margareta och jag, då mannen bakom mig lutade sig fram och frågade, om vi var på väg till en esperantosammankomst. Javisst, roligt med någon som intresserar sig för språket! Han presenterade sig – Mikael Engström, ansvarig utgivare för en ovanlig tidning "TilliT, med bara glada nyheter", som vi fick var sitt exemplar av.

Nåväl, det var inte i första hand språket som intresserade Mikael, snarare esperantos historia. "Känner ni till Valdemar Langlet?" undrade han. "Min farmor växte upp i konstnären Alex Langlets familj från nio års ålder och blev som barn i huset. Alex var bror till Valdemar Langlet. Visst startade väl Valdemar Sveriges första esperantoförening i Uppsala?" Jo, så var det förstås. Han grundade också Lingvo Internacia, som då var den enda regelbundet utgivna esperantotidskriften i världen (1895 - 1897).

Själv har Mikael inte lärt sig esperanto... ännu. Hans far, Carl Engström, hade som ung haft Einar Dahl som esperantolärare, en fantastisk lärare, som stimulerade elevernas språkinläring, utan att ge läxor. Via mobilen fick jag prata lite med Mikaelns far. De vanliga fraserna kom han ihåg, även om han nog inte hade använt språket så mycket efter skolgången.

Den period i Valdemar Langlets historia, som mest intresserade Mikael, var de nio åren i Budapest. Raoul Wallenberg känner de flesta till, Raoul, som under sex månaders vistelse i Ungern gjorde en fantastisk insats och räddade ett stort antal judar från nazisterna. Valdemar

och Nina Langlet, som under sina nio år i landet lärde sig ungerska, skaffade sig personkännedom, ordnade bostäder åt förföljda, och med fara för sina liv räddade tusentals judar och andra, som förföljdes av tyska och ungerska nazister, de har inte alls fått samma erkännande. Varför?

Mikael har varit i Budapest och träffat kunniga och pålästa historiker och tolken och läraren Agnes Harrach, som arbetat på Langletskolan i Budapest.

Agnes berättade, att skolan låg på Langletgatan och eftersom Svenska Röda Korset hade soppkök i skolbyggnaden under och en tid efter kriget, fick skolan också namnet Langletskolan. Agnes undervisade där i svenska 1989–2001. Många besökte skolan, bl.a. Olof Palme och drottning Silvia. Då barnantalet minskade, slogs skolan ihop med en annan skola, och namnet Valdemar Langlet försvann.

"Hela andra världskriget var business", ansåg professor dr Szita Szaboles, som i 31 böcker bl.a. har kartlagt nazisters handlingar. På Mikaelns fråga om vem som gjorde de största insatserna för att rädda judar undan nazisterna, påpekade Szita Szaboles att Raoul Wallenberg faktiskt stått under Himmlers beskydd "på affärsmässiga grunder" medan paret Langlet fått klara sig själva. Paret Langlet vågade i slutskedet av kriget inte sova i samma hus, för hände något en av dem, så fanns ju ändå den andra kvar för att kunna fortsätta det viktiga arbetet. De var ju inte väl sedda av nazisterna, men stannade kvar i Budapest, också sedan andra svenskar hade åkt hem.

Några ekonomiska medel från Sverige hade de inte, men de lyckades ändå ordna säkra bostäder för judar och andra förföljda genom att låna eller hyra hus, som de satte Röda Korsets emblem på. De hade många frivilliga medhjälpare, som ställde upp. Då Röda Armén hade inva-

derat Ungern, utvisades Nina och Valdemar och återvände till Sverige 1945. Raoul Wallenberg däremot blev ju förd till Ryssland och ett öde delvis höljt i dunkel. "Varför lät den mäktiga affärsfamiljen Wallenberg Raoul dö i ryskt fängelse", den frågan ställde historikern Andras Szecsenyi, som arbetar på Holocaust Memorial Center i Budapest.

Man kan också undra, varför dåvarande utrikesministern Östen Undén vägrade en fångutväxling mellan Raoul Wallenberg och en ryss? Och varför hemligstämplades material, som rörde Valdemar och Nina Langlet, i 50 år?

Valdemar Langlet var, vid sidan av sitt lektorat i svenska, också oavlönad kulturattaché på den svenska legationen i Budapest, en uppgift som han behöll också sedan han utsetts till delegat för Svenska Röda Korset. Langlet fick tillåtelse att utfärda 4 500 skyddspapper, men han tyckte det var viktigare att rädda liv än att följa regler, så han fort-



Informšildo en la parko en Upsalo. Fotis Olof Pettersson

Bilden: Mikael Engström



satte att ordna skyddspapper, s.k. Langletpass, till alla behövande. Sammanlagt blev det ungefär 25 000. Han föreslog också att Folke Bernadotte, som var ordförande för Svenska Röda korset, skulle komma till Budapest, då han insåg, att det behövdes kraftfulla insatser. Så skedde dock inte.

Langlet tvekade inte att ta kontakt med den svenske kungen, Gustav V. Det framgår bl.a. av ett dokument "Valdemar Langlet and the grateful Budapest", som man kan hitta på nätet.

Ur texten, fritt översatt: "Budapests Judiska Råd litade på Langlet. Han fick Auschwitz-rapporten, där förintelsen var dokumenterad. Omedelbart översatte han den till svenska och hade för avsikt att skicka den till Gustav V. Den svenske ambassadören i Budapest, som betvivlade dokumentets äkthet, vägrade att vidarebefordra det till kungen. Langlet gav inte upp, utan skickade dokumentet till Utrikesdepartementet, varifrån det nådde kungen, om än förse- nat. Gustav V skickade utan dröjsmål iväg ett brev till den ungerske regenten, Miklós Horthy, vilket resulterade i att deportationerna stoppades i juni 1944. Med detta initiativ lyckades Langlet rädda enormt många liv.

Ur brev från Gustaf V till Miklós Horthy:

"Efter att ha erhållit kännedom om de utomordentligt hårda metoder, som Eder regering tillgripit gentemot den judiska befolkningen i Ungern, tillåter jag mig att vända mig personligen till Eder Höghet för att i mänsklighetens namn be Eder att vidta åtgärder för att rädda dem, som ännu återstår att rädda av detta olyckliga folk."

Tyvärre återupptogs deportationerna under hösten 1944. Utrikesdepartementet skickade Raoul Wallenberg till Budapest för att organisera det humanitära arbetet. Wallenberg och Langlet arbetade nu båda för Svenska Röda Korset.

Minnena efter paret Langlet är tydligare i Ungern och Israel än i Sverige. En gata som går utmed Donau i Budapest, uppkallades först efter Raoul Wallenberg, men sedan den delats, fick ena halvan Valdemar och Nina Langlets namn, medan den andra behöll namnet Raoul Wallenbergs gata. Ytterligare någon mindre gata bär Langlets namn. Som tidigare nämnts så har även en skola uppkallats efter Langlet i Budapest. I Uppsala fick en park hans namn 2012.

Idag finns 7 hyllmeter/65 volymer texter på sju olika språk, däribland esperanto, på Handskriftsenheten i Kungliga Biblioteket i Stockholm. Nina Langlet överlämnade dem 1975–76. Det material som

hemligstämplats finns dock inte där.

Mikael använder ordet stora hjältar upprepade gånger, då han talar om Nina och Valdemar Langlet. Den 20 maj får vi möjlighet att under Esperantoföreningens vårfest i Hökälla, Göteborg, lyssna till Mikael och på storbildsskärm se de bilder ur Langlets familjealbum, som tolken Agnes Harrach fått ta hand om. Mikael har nyligen besökt henne i Budapest och fotograferat av bilderna. Även Mikael far kommer till vårfesten. Han är den ende i släkten, som liksom Nina och Valdemar har studerat Esperanto. En vårfest att se fram emot!

Siv Burell

efter telefon- och mejlkontakter med Mikael Engström

PS 1

Jag rekommenderar "Kaos i Budapest" till läsning. Tänk om Gunnar Gällmo, eller någon annan kunde översätta den till esperanto!

PS 2

I GP (Göteborgsposten den 19 maj) har jag under "Fria ord" fått in en text om de 400 försvunna esperantoböckerna. Roligt! Samtidigt är en skrivelse från resp. ordförande i de fem e-organisationerna på väg till Göteborgs Stadsbibliotek och Kulturnämnd.

DS

Pro la laboro de Franko Luin, eblas legi VOJAĜIMPRESOJ-n de Langlet surrete. Vidu: www.elerno.cn/elibro/vojagimpresoj.pdf

Dekstre: teksto el la enkonduko kiu citas Lingvo-n Internacia-n de 1895



"En pasinta somero la estro de la Upsala Klubo Esperantista, V. Langlet kaj lia amiko E. Etzel faris grandan kaj tre interesantan vojaĝon tra Rusujo, Turkujo, Rumanujo, Aŭstro-Hungarujo kaj Germanujo. La vojaĝo donis tiel bonajn rezultatojn por nia lingvo, ke ni varmege rekomendas al la amikoj de niaj aferoj tiun ĉi novan manieron por propagandado de nia lingvo. Krom tio la vojaĝo pruvis praktike, ke nia lingvo tute taŭgas por buŝaj interkomunikiĝoj de la diversnacianoj, ĉar en daŭro de la vojaĝo s-roj Langlet kaj Etzel tute libere parolis kun la rusoj sole en la lingvo Esperanto pri la plej diversaj objektoj. Precipe rimarkinda estas la fakto, ke s-ro Etzel ellernis la lingvon *en daŭro de la vojaĝo mem*, t. e. en daŭro de kelkaj tagoj, kaj poste uzadis ĝin kun plena sukceso."

Kalle Kniivilä pri

”Homoj de Putin”

La 22-an de aprilo 2015 en la kafejo de la biblioteko de Järnåkra en Lund, Kalle Kniivilä, en la sveda lingvo, rakontis pri sia libro ”Putins folk” (Homoj de Putin). Li vojaĝis en Rusio por renkonti subtenantojn de Putin, kies voĉoj malofte aŭdiĝas en eksterlandaj amaskomunikiloj.

Post la prelego li interese kaj ĝisfunde respondis bonajn kaj trafajn demandojn de la multnombra publiko.

Kalle konkludas ke la granda plimulto de la rusia popolo, almenaŭ ekster la grandurboj, estas kontenta pri Putin. Li estas forta gvidanto, kiu stiris la landon al stabileco kaj kreskanta prospero post la falo de Sovetunio. Homoj ĝenerale ne interesiĝas pri politiko kaj ne serĉas informojn ekster la ŝtate kontrolitaj amaskomunikiloj. La vorto *demokratio* ilin rememorigas pri la kaosaj kaj mizeraj 1990-aj jaroj kaj tion ili ne volas ankoraŭfoje sperti. Oni scias kion oni havas sed ne kion oni ricevos, kaj tial preferas denove voĉdoni por Putin.

Ann-Louise Åkerlund



Kutime ni Esperanto-parolantoj estas ekstrema malplimulto en la socio. Oni povas taksu, ke ĝis nun troviĝas nur unu parolanto de Esperanto inter mil parolantoj de la angla lingvo (kiel fremdlingvo). Nur 0,1 procentoj...

Jam estis klare, ke tiu procentaĵo estas pli alta ĉe homoj kun pli da lingvo-scio. Eble inter cent homoj kun du (naciaj) fremdlingvoj troviĝas unu, kiu parolas aldone Esperanton. Jam pli bone, – 1 procento...

Ĝus okazis la dua *Polyglot Gathering* en Berlino. (Vidu: <http://polyglotberlin.com/>) Partoprenis tiun renkontiĝon por multlingvuloj entute proks. 350 homoj. El ili 320 informis, ke ili povas/pretas sekvi prelegon en la angla lingvo, kaj proks. 80, ke

ili povas sekvi prelegon en Esperanto, do unu kvarono. Verŝajne escepta okazo, ke Esperanto havas ekster Esperantujo tiel altan proporcion de unu el kvar.

Estas certe, ke la renkontiĝo konatiĝis pli multe en (ĉefe junularaj) Esperanto-rondoj, do ili verŝajne allogiĝis pli multe. Sed estas konstateble, ke ankaŭ iuj multlingvuloj sen aparta ligo al la Esperanto-komunumo parolas almenaŭ baze Esperanton.

Dum la renkontiĝo oni cetere aŭdis ĉefe tri lingvojn en la koridoroj: la anglan, la germanan kaj Esperanton. Kaj, ni konsciu, Esperanto ne havas la trian lokon laŭ la lingvoscio – la statistiko notas pli ol kvin lingvojn inter la angla kaj Esperanto, ekz. la francan, hispanan, rusan... Estas eble tiel, ke la Esperanto-parolantoj pli bone konas kaj

retrovas unu la alian. Kaj ankaŭ tiel, ke por ili Esperanto ofte estas tre flua lingvo, kiu bezonas plu preskaŭ neniam da peno. (Ja en enketo ĉe Facebook du trionoj de la homoj parolantaj Esperanton dum pli ol kvin jaroj indikis, ke Esperanto estas ilia plej bona fremdlingvo.)

Se vi serĉas ion por kritiki: La retejo estas verkita nur en la angla lingvo. Hororo por la ĝisosta esperantisto... :-)) Des pli impresive, ke tiom da Esperanto-parolantoj ĉeestis kaj kunagis.

Lu Wunsch-Rolshoven
<http://www.esperanto.land>



Nur unu parolanto de Esperanto inter mil parolantoj de la angla lingvo

Saluton de paco al ĉiuj esperantistaj organizoj!


Vide al la kreskantaj politikaj kaj ekonomiaj konfliktoj en la mondo, ni ripetas la firman konvinkon ke nia unua tasko kiel esperantistoj estas mem praktiki kaj apogi la fortojn de ne-perforto kaj dialogo ĉie ajn en la planedo. Neniu solvo de sociaj ekonomiaj konfliktoj troveblas en perforto, minacado kaj neniigo de vivoj de simplaj homoj.

Ni postulas de la politikistoj de la registaroj la ĉesigon de primitiva agresa agado en interpopolaj rilatoj.

Stockholm 2015-02-25
Membroj de Esperantoklubo de Stokholmo

Antaŭ 70 jaroj naskiĝis Pipi Ŝtrumpolonga

Pipi Ŝtrumpolonga estas konata figuro de la infanaj libroj, skribitaj de Astrid Lindgren. Unuan fojon aperis la libro 1945. La plej sukcesaj el tiuj prilaboroj estas la kvar filmoj pri Pipi Ŝtrumpolonga el la jaroj 1969 kaj 1970, en kiuj la knabino Inger Nilsson ludas la rolon de Pipi. La romanoj kaj filmoj tradukiĝis en multaj lingvoj de la mondo. En Esperanton tradukis Sven Alexandersson 1989.



En Esperanto aperis ankaŭ:

La fratoj Leonkoro (Bröderna Lejonhjärta), 1987. Trad.: Kerstin Rohdin.

Emilo de Smolando (Emil i Lönneberga), 1993. Trad.: Harold Brown kaj Kerstin Rohdin.

Ronjo, rabista filino (Ronja Rövardotter), 2001. Trad.: Runo Stridell.

Mio, mia filo (Mio, min Mio), 2006. Trad.: Leif Nordenstorm.

Por e-libro vidu <http://cindymckee.com/librejo/Lindgren,Astrid-PipiSxtrumpolonga.pdf>

[Informo el Vikipedio]



JUNA AMIKO,
septembro 1973,
aprilo 2005,
februaro 2014

Juna amiko: nun legeblaj kaj elŝuteblaj rete

Ĉiuj numeroj de Juna Amiko (krom la lastaj du jaroj) estas legeblaj ĉe www.eventoj.hu sub la titolo JUNA AMIKO - ARKIVO DE 40 JAROJ. Ĉiuj permesoj kaj malpermesoj apartenas al eldonintoj de la originalo.

Ĉerpo el EKO 2015-20 majo 22

Stefan MacGill

Vicprezidanto de UEA

Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.



Rapida vizito al Romo


Fine de aprilo ĉi-printempe, mi kaj mia edzino plilongigis la semajnfinojn kaj vizitis Romon. Belega urbo! La historio (almenaŭ mia memoro pri ĝi) viviĝas en tia ĉirkaŭaĵo. Kvankam la vizitindaĵoj estas plurcent- aŭ eĉ plurmiljaraj, mi tamen spertis ke multe ŝanĝiĝis de post mia junaĝa vizito antaŭ 40 jaroj. Tiom da turistoj!! La modernaj komunikiloj plifaciligas kaj ebligas vojaĝojn.

Kompreneble ni vizitis la St. Petro-katedralon, sed ankaŭ ne same konatajn preĝejojn kiel Sta. Maria in Trastevere kaj St. Giovanni in Laterano. Ankaŭ la muzeo de Vatikano, kun impona kolekto de etruskaj artefaktoj, faris grandan impreson al ni.

Dum nia mallonga restado ni ankaŭ vizitis Carlo SARANDREA, kiu prizorgas la esperantajn radio-elsendojn de Radio Vatikano, kaj li

faris kelkminutan intervjuon kun ni. En la esperantogrupo en Romo, kiu konvene kunvenis nian lastan vesperon, prezentis juna rusa astronomia doktora studentino teorion pri stela evoluado. Kvankam teorie altnivela, ŝi sukcesis klarigi al ni, nefakuloj, la malfacile observeblan fenomenon, kiu okazas fore super ni.

Tiun vesperon ni kune kun la grupo vespermanĝis en Trastevere kaj poste kuris hejmen en pluvo.



Bengt Olof Åradsson